

Biblioteko de Kiuŝuu Esperantista Ligo

N-ro I

KOSECU FUJISAŬA

GRACIA

— Historia Dramo —



esperantigita de M. Hata kaj T. Murakami

九州エスペランチスト聯盟 (K. E. L.) 叢書

第一篇

グ ラ シ ャ

— 史 劇 —

原 作	藤 澤 古 雪
エス 譯	{ 畑 正 世 村 上 知 行

財團 日本エスペラント學會
法人

BIBLIOTEKO DE
KIUŜUU ESPERANTISTA LIGO
— N-ro 1 —

KOSECU FUJISAŬA
GRACIA

Esperantigis

M. HATA kaj T. MURAKAMI

JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Ŝin'Ogaŭamaĉi III-15, Uŝigome, TOKIO

PERSONOJ

Gracia	(Sinjorino de Hosokaŭa-Tadaoki— Daimio)
Ogasaŭara-Ŝoosai	(Vasalo de Hosokaŭa)
Kaŭakita-Iŭami	(„ „)
Hajami-Sanzoo	(Vasalo de Kaŭakita)
Hacuŝimo	(Favorata servistino de Gracia)
Ĉooken	(Bonzino)

Kelkaj orfoj kaj servistinoj por la sinjorino.

LOKO

En la domo de Hosokaŭa-Tadaoki en Oosaka.

TEMPO

La 17-a de Julio en la 5-jaro de Keiĉoo (1600).

HISTORIA KLARIGO

Tojotomi-Hidejoŝi, granda generalo konstruis kastelon en Oosaka kaj tie loĝante regis tutan Japanujon. Kiam li mortis, lia heredanto Hidejori ankoraŭ estis tro juna kaj ne kapablis regi. Laŭ la komi-

sio de Hidejoŝi, la ĉefministro Tokugaŭa-Iejasu helpis la junan sinjoron Hidejori kun aliaj altranguloj, inter kiuj sin trovis Iŝida-Ĝibuŝoo kaj ĉiam sin tenadis malpaca kontraŭ Iejasu.

Iejasu mem estis tre ambicia kaj havis deziron ribeli al Hidejori kaj mem regi la tutan landon. Hosokaŭa-Tadaoki, edzo de Gracia, estis la plej fidela amiko de Iejasu kaj ne ŝparis helpon al lia ambicia intrigo.

En tia cirkonstanco uragano ne povas ne okazi!

Uesugi-Kagekacu, feŭda sinjoro de Aizu, kiu estis urbo tre malproksima de Oosaka, ribelis kontraŭ Hidejori. Kaj Iejasu iris al Kantoo-distrikto por batali kun Uesugi. Kelkaj daimioj akompanis al la militiro de Iejasu, restigante garantiulojn en la kastelo de Oosaka, ĉar Iŝida-Ĝibuŝoo tion devigis al ili.

Kial Ĝibuŝoo postulis garantiulon? La kaŭzo estas jene:—Li intencis, dum la foresto de Iejasu, frakasi lian intrigon kaj lin pereigi. Se li tenas kiel garantiulon en la kastelo edzinon aŭ filon de la daimioj, kiuj akompanis al Iejasu, li povas malhelpi tion, ke la daimioj kuraĝus aldoniĝi al la armeo de Iejasu kaj turni lancon kontraŭ Hidejori.

Hosokaŭa-Tadaoki akompanis al Iejasu ĝis Kantoo-distrikto, restigante sian edzinon Gracia en Oosaka. Antaŭ ol deklari militon kontraŭ Iejasu, Iŝida-Ĝibuŝoo volis teni Gracia en la kastelo kiel garantiulon, sed ŝi ne obeis sed preferis sinmortigon.

Kial ŝi sin mortigis? Estas kvar gravaj kaŭzoj.

(1) Ŝi estis kristanino kaj kredis ĉielan vivon.

(2) Ŝi estis filino de Akeĉi-Micuhide, kiu estis malestimata kiel uzurpanto. Ŝi ĉiam sentis honton je la malhonoro de la patro, kaj ŝi timis, ke se ŝi fariĝus garantiulino, oni ŝin malestimus, dirante, "Ŝi estas filino de la uzurpanto, do estas nature, ke ŝi ne ofendsentas, sed malkuraĝe fariĝis garantiulino."

- (3) Ŝi havis kuraĝon kaj firman karakteron kaj estis racia.
(4) Ŝi vivis en la atmosfero de Buŝidoo (Japana kavalira moralo), kiu instruas, ke se oni trovas antaŭ si nur du vojojn; nome ofendiĝon kaj sinmortigon, rifuzu la antaŭan kaj preferu la lastan.

— Sceno Unua —

Salono en la domo de Hosokaŭa.

Vespere de la 17-a Julio 1600.

Orfoj Senĉijo, Gaŭoo-maru, Kameŭaka-maru, Goboo-maru kaj orfinoj Mantoku, Siragiku interdisputas.

Kameŭaka kaj Gaŭoo interbatalas; tion Senĉijo kaj Goboo penas pacigi, aliaj timeme ploretas.

Bruo de vento.

Kameŭaka:—Manon for! Vi obstina Gaŭoo!

Gaŭoo:—Vi mem! Vi mem estas obstina! Ĉi tiun ventumilon Mantoku pruntedonis al mi.

Kameŭaka:—Ne mensogu! (turnante sin al Mantoku) De vi pruteprenis mi mem, ĉu ne? Ĉar Mantoku tre bone ludis la danmuzikon, kiun ni lernis lastan vesperon, Ŝiragiku deziris takti kaj mi deziris danci per la ventumilo; sed vi min malhelpas, mokante min pro mia malpliageco.

Gaŭoo:—Do, vi mem scias vian malpliagecon, kial vi arogante kondutas antaŭ mi? Fi, vi sengepatra bubaĉo!

Kameŭaka :—Vi mem estas sengepatra! Vi intencis nin embarasigi per via diabla malhelpo.

Gaŭoo :—Mi ne malhelpas, sed vi!

Kameŭaka :—He! Vi ankoraŭ insistas! Manon for, manon for! Ĉesu vian obstinaĵon!

Goboo :—Hej, Kameŭaka kaj Gaŭoo! Se nia mastrino aŭdus...!

Kameŭaka :—Mi ne timas la mastrinon, ĉar mi estas justa. Kial ŝi riproĉus min?

Gaŭoo :—Neniel vi estas justa! Mi mem estas justa.

Kameŭaka :—Ne! Mi estas justa!

Gaŭoo :—Ne! Mi estas justa.

Senĉiĵo :—Jam ĉesu disputadon kaj reciproke forigu manojn.

Pli kaj pli laŭtiĝas ilia disputado. Knabinetoj nur ploras konfuzite.

Ŝiragiku :—Hej, venu iu ĉesigu ilin!

Mantoku :—Ho ve! Mia ventumilo jen rompiĝos!

— Sceno Dua —

De maldekstre laŭ la verando sin montras Gracia, edzino de Hosokaŭa-Tadaoki, tenante en siaj brakoj unujaran orfeton.

SinJORino :—Ho! Dio mia! Denove vi disputas furioze pro bagatelajo! Kvankam vi estas knabetoj, vi jam

sufiĉe kreskis por esti prudentaj. Dum vi devas ami unu la alian... Kaj kiaj kompatindaj knabetoj!

Ĉiuj orfoj hontiĝas.

Gaŭoo:—Mi estas kulpa, bonvolu pardoni min, sinjorino.

Kameŭaka:—Ne, kulpa estas mi mem, bonvolu pardoni min, sinjorino.

Sinjorino:—Bone, nur se vi ludas kune sen disputo. Iru en vian ĉambron kaj ludu paceme la triktrakon kiel kutime, ĉar restas sufiĉe da tempo ĝis la preĝhor.

Kameŭaka:—Jes, ni ludos paceme, sinjorino. Ankaŭ mia Gaŭoo-maru, ĉu ne?

Gaŭoo:—Jes, nur ne koleru, Kameŭaka, ĉar miaflanke mi kore amos vin.

Kameŭaka:—Kompreneble! Kial mi kolerus? Nu, hej Goboo, Senĉijo, Ŝiragiku kaj Mantoku.

Senĉijo:—Ni ĉiuj kune...

Goboo:—Iru en la najbaran ĉambron.

Ĉiuj orfoj estas forirontaj.

Sinjorino:—Miaj geknabetoj! Mi ripete admonas ke vi estu neniam disputemaj kaj interbatalemaj.

Senĉijo:—Jes, sinjorino, ni bone komprenas.

Kameŭaka:—Je Dio, ni amos nin reciproke.

Ĉiuj orfoj kune foriras dekstren.

— Scene Tria —

Sinjinorino (sekvante ilin per vido)

Ĉiaokaze ili estas ĵaluzaj kaj emas interbatali, koleriĝante pro bagatelaĵoj, kiel ordinare ĉe ĉiuj orfoj. Maltrankvila estas mi pri ilia estonteco, kvankam mia penado kreskigis ilin ĝis nun. Kie kaj kiel vivas iliaj gepatroj? Kompatindaj orfoj ili estas!

Ekploras la bubeto en ŝiaj brakoj.

Sinjinorino:—Ho! Kiel? Mia amata! Jes, eble ĝi malsatiĝis. Hej, venu iu ajn!

Ŝia servistino venas.

Servistino:—Jes, kiel mi povos servi?

Sinjinorino:—Pretigu lakton kiel kutime, mi petas.

Servistino:—Jes, bone, sinjinorino.

Ŝi foriras.

— Sceno Kvara —

Favorata servistino Hacuŝimo venas de maldekstre.

Hacuŝimo:—Ha! Mi trovis vin, via sinjinorina moŝto! Mi serĉadis vin de ĉambro al ĉambro.

Sinjinorino:—Kion vi havas al mi diri?

Hacuŝimo:—Ĉooken la bonzino, kiu vizitadas vin ofte, ĵus venis kun iu sekreta misio kiel senditino el la kastelo. Kiel ni aranĝu? Vian instruckcion mi petas.

SinJORino :—Ĉooken venis kiel senditino, vi diris?

Hacuŝimo :—Jes, sinJORino.

SinJORino :—Ho, mi vidas ke Iŝida-Ĝibuŝoo, kiu estas malpacema kun mia edzo, fine sin turnis al mi sekrete pere de la bonzino, por preni min kiel garantiulinon!

Ŝi enpensiĝas kelkajn minutojn.

SinJORino :—Diru ke ŝi venu ĉi tien.

Hacuŝimo :—Jes, sinJORino.

Hacuŝimo malaperas.

— Sceno Kvina —

Longa somertago jam krepuskiĝis kaj servistino lumigas paperlampon.

Venas Ĉooken, la bonzino, sekvate de Hacuŝimo kaj alia servistino.

SinJORino :—Saluton al vi kiel senditino, estimata bonzino.

Ĉooken :—Via kompleza saluto honoras min. Lia nobla moŝto, Iŝida-Ĝibuŝoo, komisiis al mi, ke mi kunparolu kun vi ĝis via plena kompreno, ĉar virino bone komprenas virinon. Tial mi venis, kvankam tia tasko ne konvenas al mi, kaj nun mi kun ĝojo trovas, ke vi estas tre sana kiel ĉiam, tute ne ĝenata de l' varmego somera.

SinJORINO:—Kaj pri kia afero?

Ĉooken:—Estas jene, aŭskultu! Kiel vi jam konas, la ĉefministro Iejasu intencis batalon kontraŭ Uesugi kaj militiris al Kantoo-distrikto. Okaze de tio kelkaj daimioj, kiuj akompanis lin al la militiro, restigis en la kastelo de nia estro Hidejori edzinojn aŭ filojn kiel garantiulojn. Pro kio? Jen estas kaŭzo: post la morto de nia granda moŝto Hidejoŝi, la ĉefministro Iejasu, kiu estas komisiita de Hidejoŝi pri la regado, pro la trojuno de nia nuntempa estro Hidejori, la filo de Hidejoŝi, ĉiam agadas arogante, kaj eĉ aŭdiĝas famo pri terura ribelo. Komprenoble ni ne povas kredi la famon, sed devas nin gardi atente, ĉar kie estas fajro, estas fumo, ĉu ne? Se Iejasu vere havus intencon de ribelo, tiam lia militiro estus al li tre bona ŝanco. Tion timis sinjoro Iŝida-Ĝibuŝoo, vasalo de Hidejori kaj ĉe la militiro postulis garantiulon al ĉiu daimio. Ni komprenoble kredas la lojalecon de via familio, sed ĉar malprudenta famo, se unufoje ekaŭdiĝas, jam ne povas silentiĝi. Nur eviti malagrablajon, do, vi transloĝiĝu en la kastelon. Tion sinjoro Ĝibuŝoo petas al vi pere de mia buŝo.

SinJORINO:—Do, sinjoro Ĝibuŝoo diris, ke mi envenu en la kastelon kiel garantiulino?

Ĉooken:—La vorto garantiulino havas en si ion ofendan, sed nur por kelka tempo en la kastelon...

SinJORINO:—Via klopodo estas dankinda. Tamen mi

ne povas akcepti tion, kvankam mi dankas lian bonvolecon, ĉar nuntempe mi estas malsanema kaj vivas kvazaŭ en sonĝo. Estus hontinde, se oni vidus min en tia stato. Tadaoki mem estas ĉiam lojala. Lia moŝto Hidejori neniam suspektos lin eĉ se li ne sendos garantiulinon.

Ĉooken:—Do vi bonvolu iri al la domo de sinjoro Ukita-Haĉiroo, ĉar li estas via najbaro kaj ankaŭ unu el viaj parencoj. Tiam oni ne kredos, ke vi iras kiel garantiulino. Kiel plaĉas al vi ĉi tiu propono, sinjorino?

Sinjinorino:—Prave, tamen mi ne povas konsenti pro iu kaŭzo, kvankam sinjoro Haĉiroo estas nia parenco.

Ĉooken:—Kaj kia estas tiu kaŭzo via?

Sinjinorino:—Senutile estus se vi aŭdus. Ne demandu, mi petas.

Ĉooken:—Do, neniel vi povus eliri de ĉi tie...?

Sinjinorino:—Garantiulino estas garantiulino, kien ajn ŝi estas sendita... Permesu min ripeti, ke mia edzo, Hosokaŭa-Tadaoki, estas tiel lojala, kiel oni bezonas neniun garantiulon. Tion vi raportu ĉe via reveno en la kastelo, mi petas.

Ĉooken:—Al via familio tiel lojala estas strange, ke en la lasta noktomezo ŝtele estis sendataj la patrino kaj la edzino de la filo, ien tra la malantaŭa pordego...

Sinjinorino:—Ho!

Ĉooken :—Sufiĉe jam ! Mia tasko finiĝis. Mi adiaŭas vin, via sinjorina moŝto.

Ĉooken eliras post riverenco. Sekvas ŝin Hacuŝimo kaj la servistino. Restas sola la sinjorino en pensado . . .

—Sceno Sesa—

Kaŭakita-Iŭami kaj Ogasaŭara-Ŝosai aperas de maldekstre kaj sinklinas vizaĝalplanke antaŭ la sinjorino.

Sinjorino :—Ho, vi ambaŭ ! Ĉu vi ĵus aŭskultis . . . ?

Ogasaŭara-Ŝosai :—Jes, sinjorino. Ĝuste kiam ni venis ĉi tien por aŭdienco, ni aŭdis la bonzinon parolanta kun ceremonia tono. Indulgu ke ni aŭskultis ĉion de la apuda ĉambro.

Sinjorino :—Kaj pro kio vi venis ?

Ogasaŭara :—Jam ne bezonas diri, ĉar vi sciiĝis de la senditino sekreta . . . Verdire, lastatempe senditoj de sinjoro Ĝibuŝoo venis al ni kelkajn fojojn . . .

Sinjorino :—Jam kelkajn fojojn, ĉu vere ?

Ogasaŭara :—Jes, ili diris, same kiel la bonzino, ke oni nepre sendu vin en la kastelon kiel la garantiulinon.

Kaŭakita :—Ĉiufoje kaj ankaŭ hieraŭ ni petis ilin foriri kun la komuniko, ke sinjorino estas malsana, tial oni atendu kelkan tempon ĝis vi resaniĝos, sed . . .

Ogasaŭara :—Hodiaŭ venis oficiala sendito, kiu diras : „Hodiaŭ nepre venigu la sinjorinon en la kastelon, ni

portis palankenon pro ŝia malsano, kiu certe ne estus danĝera.“ Krom tio, li akompanigis al si pli ol tridek armitaj soldatoj, junaj kaj fortaj.

Kaŭakita :—Dronanto kaptas eĉ pajlon ; same ni klopodis eĉ mallongan prokrastigon. Ni diris al la sendito, ke li bonvolu atendi ĝis la dekunua ĉi-nokte, tiam ni penos persvadi nian sinjorinon kaj obeigos al la ordono. Li konsentis nian peton kaj ĵus foriris. Kaj nun...

Ogasaŭara :—...Ni miris je la ruzeco de Iŝida-Ĝibuŝoo, ĉar li aranĝis duoblajn senditojn, nome sekre-
tan kaj oficialan, por vin garantiulinigi. Kia artifiko!

Kaŭakita :—Nun ni venis kun severe serioza peto.

Ogasaŭara :—Humile ni petas, ke vi nepre konsentu...

Sinjorino :—Kion ? Nu diru.

Ambaŭ :—Nu do...

Hezite ili ne kuraĝas eldiri.

La sinjorino sin tenas digne kaj diras.

Sinjorino :—Memmortigon, ĉu ne ?

Ambaŭ :—Ja...

Ambaŭ ne kuraĝas plu, kaj silentas.

Sinjorino :—Mia koro jam de longe estas preta por
tio. Senhezite eldiru kion ajn.

Ogasaŭara :—Jam mi ne povas ne diri. Aŭskultu,
mi petas. Nature estas, ke nia mastro, sinjoro Tadaoki,
estas la plej fidela amiko de la ĉefministro Iejasu. Li
vokis nin ĉe sia ekiro al Kantoo kaj severe ordonis,

mesataj vidi Dion en la ĉielo sed ankaŭ senevite fariĝos pekuloj por eterne, ĉar vi kredas Budaismon kaj Ŝintoisman.³⁾

Ogasaŭara:—Ni havas tamen nian propran moralon malgraŭ via doktrino. Kiel ajn estu la estonteco! Severa estas nia samurajismo. Se ni vivados post via sinmortigo oni riproĉos nin, dirante malestime: jen, la vasaloj de Hosokaŭa vivadas spite la morton de sia mastrino. Kaj ankaŭ diros: ili estas malestimindaj kanajloj, ne taŭgaj por samurajoj! Se vi ne permesas al ni uzi glavon, tiam ni sekvos vin per fastado aŭ ni ĵetos nin en fajron!

SinJORino:—Neniel vi povas, ĉar la ĉiela Sinjoro malpermesas vian morton.

Kaŭakita:—Eĉ se la Sinjoro malpermesas, laŭ la morala principo japana, estas juste sinmortigi sekvante la mastrinon. Se vi ne permesas, nur implicitu, ni petas.

SinJORino:—Vi do kredu la doktrinon de Dio antaŭ via morto, se vi tiel deziras morti.

Ogasaŭara:—Kiel ni povus tion...!

Kaŭakita:—Ni ne havas tempon por tio, ĉar tiu ĉi okazo estas tre urĝa.

Ogasaŭara:—Malpermesi mortakompanion kun la mastrino estas same kiel malpermesi la agon honoratan en Japanujo. Kiel ni povus obei tian doktrinon!

Sinjinorino :—Ĉesu senutilan diskutadon, ni devas ŝpari tempon. Preparu ĉion dum oni ne konas.

Kaŭakita :—Ni bedaŭras, ke ni ĝenis vin, sed ni supozas, ke vi povas kompreni nian profundan kordoloregon.

Ogasaŭara :—Indulgu niajn maldecajn vortojn, ni petas.

La sinjinorino estas forironta internen, tiam vento susurras kaj la lumo estingiĝas. La luno sendas sian lumon profunde sur la verandon. La sinjinorino enpenŝiĝas.

Sinjinorino :—Estingis nokta vent' subite lumeton kiu eĉ sen vento mortiĝos se oleo konsumiĝos.

Ogasaŭara :—Surtera lumo malaperis sed lum' ĉiela jen aperis !

Kaŭakita :—Rememorigas nun la luno min pri la tempo ĉagrena, larma de l' sinjinorino.

Sinjinorino :—Pro malfeliĉa vivo mi kredas nur ĉielan Dion.

Ogasaŭara :—For de la mondo vi vivadis profunde en Mitono monto.

Kaŭakita :—Por dekdu jarojn tre malgaje.

Sinjinorino :—Kaj poste povis vivi kun l' edzo kaj infanoj sed jam la ĝoja sonĝo finiĝis, ho, nun malfeliĉe.

Ogasaŭara :—Ho, efemera homa vivo !

Kaŭakita :—Domaĝa estas stato monda !

Ili intervidas reciproke silente.

Sinjinorino :—Mi iros en l' eternan vivon.

Sur ŝia vizaĝo aperas ŝia firma decido. En la ĉielo nubo plidensiĝas kaj la lunlumo pli kaj pli malfortiĝas. Susurado de vento. Ĉirpado de insektoj.

—Sceno sepa—

La buduaro de la sinjinorino. Dekstre, pendas kurteno antaŭ altaro. La sinjinorino kun la bubeto en siaj brakoj sidas kontraŭ Hacuŝimo. Apude sur skribtablo kuŝas papero kun ŝia lasta adiaŭa odo.⁴⁾ Malfrue en la nokto. Pli fortiĝas la ĉirpado de insektaj.

Sinjinorino :—Kvankam vi fervore deziras, mi ne povas permesi vian memmortigon. Aŭskultu, Hacuŝimo, kiu zorgos pri la multaj orfoj post mia morto? Mi pensas, ke vi estas virino, sekve la kastelaj soldatoj ne persekutos vin severe; do vi povos oportune forkuri. Tial mi petas: kaŝu vin ie kun la orfoj, ĝis la tumulto finiĝos. Kaj atendu la tempon, kiam mia edzo triumfe revenos, kaj lin renkontu kaj detale rakontu pri mia sinmortigo. Se vi bonvole konsentos, ne sola mi kontentiĝos sed ankaŭ ili dankos al vi.

Hacuŝimo :—Jes, laŭ via instrukcio mi postvivos malgaraŭ mia deziro. Mi atendos ĝis la mastro kaj ĉiuj aliaj revenos triumfe kaj rakontos ĉion ĉi detale al ili.

Sinjinorino:—Ha, mi estas tre ĝoja ke vi konsentis.

Jen, ĉi tiu estas nur unujara bubeto. Kompatinda estus ĝi se neniu volus ĝin nutri. Ĉu vi bonvolos ĝin prizorgi ĝis ĝi sufiĉe fortiĝos? Mi ree petas.

Hacuŝimo:—Jes, sinjinorino, mi nepre zorgos, eĉ se mi malsatiĝus ĝi estos ĉiam sata.

Sinjinorino:—Kaj tiu ĉi estas odo. Montru ĝin al mia edzo.

Hacuŝimo:—Jes, mi volonte plenumos vian komision. Ambaŭ pozas en malgajaj. Ekploras la bubeto.

Sinjinorino:—Ho! Kiel! Mia amata!

La bubeto ĉesas plori kaj endormiĝas trankvile.

Sinjinorino:—Ĝi ree endormiĝis trankvile, sciante nenion pri ĉi tiu malĝojo. Ĉarma estas vi!

Lulante ĝin ŝi donas al Hacuŝimo.

Hacuŝimo:—Kie estas vivo, estas malĝojo; tio estas neŝanĝebla en la mondo. Kreskigi tiun naivan infanon, estas samtempe alproksimigi al la abismo de malĝojo!

—Sceno Oka—

Tiam unu el la servistinoj venas kun la orfoj, kiuj jam aperis en la Sceno Unua.

Servistino:—Laŭ via ordono, mi alkondukis ilin.

Sinjinorino:—Ho, vi venis ĉiuj? Pardonu ke mi en tia profunda nokto vekis vin el dormo, sed mi ne povis alimaniere. Nu, bone aŭskultu min, miaj karaj geknabetoj... Eble vi jam aŭdis kaj divenis la nunan

aferon, sed nun mi per mia buŝo vin sciigas, ke ĉi tiu nokto estas la lasta por mi.

Goboomaru:—Ho, vi mortos tiun ĉi nokton, sinjorino?

Sinjorino:—Jes, vere. Kaj mi iros en la ĉielon.

Goboomaru:—Mi aŭdis ke en la ĉielo tronas Dio.

Sinjorino, ankaŭ min akompanu al la ĉielo, mi petas, kaj mi denun ĉesos petoli.

Mantoku:—Ankaŭ min... Bonvole.

Ŝiragiku:—Ankaŭ min...

Kameŭaka:—Kaj ĉiujn kune...

Gaŭoomaru:—Akompanon ni kore petas.

Sinjorino:—Kion vi diras? Mi estas devigita min mortigi pro neevitebla cirkonstanco. Vi ĉiuj ankoraŭ povas longe vivi, do kial mi povus lasi vin morti! Post mia morto, vi amu vin reciproke, adoru Dion. Diligente lernu ne nur militarton sed ankaŭ legi kaj skribi, kaj fariĝu veraj herooj.

Nia Sinjoro en la ĉielo ĉiam gardos vin favore.

Goboomaru:—Jes, ni bone komprenis vin, sed post via foriro, ni denove fariĝos senhelpaj orfoj kiel antaŭe.

Kameŭaka:—Kiu zorgos pri ni ĉiuj!

Gaŭoomaru:—Mi timas ke oni turmentos nin, dirante „Orfaĉoj forlasitaj“. Ho, kiel malĝoja estos nia estonteco!

Senĉijo:—Malĝojega estas mi, kaj ne povas deteni larmon!

Sinjinorino :—Ho ! Vi eble. Tre prave. Se mi povus, mi dezirus vivi por ĉiam ĝis via plenkreskiĝo, sed tion ne permesas al mi la mondo senlarma. Mi kore petis al Hacuŝimo ke ŝi prizorgu vin anstataŭ mi. Tial vi obeu ŝin, pensante ke ŝi estas via vera mastrino kaj patrino, kaj fariĝu homoj laŭdindaj.

Ĉiuj orfoj kune :—Jes, sinjinorino.

Ĉiuj ploras.

Sinjinorino :—Ĉu vi komprenis mian diron ? Do forkuru kune kun Hacuŝimo, kiel eble plej baldaŭ.

Orfoj ĉiuj :—Jes.

Sinjinorino :—Saĝaj vi estas. Iru tuj !

Kameŭaka :—Sed, sinjinorino, depost nia foriro, jam ni neniam povos revidi vin. Tio estas por ni granda malĝojo.

Sinjinorino :—He, ĉu vi forgesis la renaskiĝon en la ĉielo ?

Kameŭaka :—Ne, ni bone memoras. Tamen . . .

Sinjinorino :—Kial vi malĝojas se vi memoras ? Nu, ne hezitu sed foriru rapide.

Hacuŝimo :—Nu, geknabetoj, ni iru. Sed dum vivo ni neniam . . .

Sinjinorino :—Eĉ vi, Hacuŝimo, malkuraĝas tiel ankaŭ !

Hacuŝimo :—Ne, jam . . .

Sinjinorino :—Tuj iru vi ĉiuj.

Hacuŝimo :—Jes, sinjinorino.

Hacuŝimo forkondukas la orfojn.

La sinjorino sekvas ilin per vido.

Sinjorino:—Jam ĉio estas preta, serena estas mia koro!

Pozo signifa.

—Sceno Naŭa—

Tiam horloĝo sonoras la dekunuan horon.

Ogasaŭara aperas de maldekstre.

Ogasaŭara:—Ĵus sonoris la dekunua horo. Prokrasto faros malhelpon. Sinjorino, preparu por via fino.

Sinjorino:—Jes, mi faros. Sed nur la lastan oracion⁵⁾ al la Sinjoro.

Ogasaŭara:—Preĝu trankvile.

La sinjorino stariĝas ĝentile kaj flankenpuŝas la kurtendon antaŭ la altaro. En la altaro estas bildo de la Sankta Virgulino Mario kun la Sankta Infano en ŝiaj brakoj, antaŭ kiu estas konvene metitaj kandelingo, incensilo, vazo ktp. La sinjorino incensas kaj kultas pie antaŭ ili. Kaj krucinte ĉe sia brusto, ŝi preĝas la lastan oracion.

Sinjorino:—Patro nia en la ĉielo, aŭskultu! Mi estas devigata min mortigi. Tio kompreneble estas peko senmezure terurega kaj bedaŭrinda, tamen la okazo neniel permesas alian vojon. Mi divenas ke tio estus la providenco de nia Dio adorata. Ho, indulgu mian pekon kaj donu al mi trankvilan animon kaj puran morton. Amen!

Rapide venas Hajami-Sanzoo, la vasalo de Kaŭakita.

Hajami:—Sinjorino, mi devas al vi sciigi...

Ogasaŭara:—Ho, kion?

Hajami:—Inatomi perfidis.

Ogasaŭara:—Kiel! Ĉu Inatomi?

Sinjorino:—Ĉu li perfidis?

Hajami:—Jes, la sendito, kiu antaŭ kelka tempo denove venis, kun pli ol cento da soldatoj en kiraso, atakis la okcidentan pordegon. Inatomi, kiu gardis tie, malfermis la pordegon kaj kune kun la malamikoj alvenis ĝis la meza pordego. Kaj ni nun defendas ilin per nia tuta forto. Laŭ la ordono de nia mastro, mi rapidis al vi por sciigi. Permesu min foriri.

Hajami foriras.

Sinjorino:—Vere, tiel ne fidinda estas homa koro! La kastelanoj tuj venos ĉi tien, ĉar Inatomi ilin helpas. Mi ne povas plu proskrasti.

Ogasaŭara:—Jes, tuj...

Sinjorino:—Jes, kompreneble... Mi timas, ke mi devas blasfemi tiun ĉi preĝĉambbron per mia sango. Sed jam ne estas tempo perdi. Ho, Dio, min pardonu! Nu, Ogasaŭara, mi petas vian asiston!

Ogasaŭara:—Jes, mi estas preta. Sed maldeca estas asisto de viro apud sinjorino... Nu, kiel fari... Ho, oportune! Per tiu longtenila halebardo⁷⁾ mi plenumos mian taskon el la apuda ĉambro.

Sinjorino:—Ha, deca rimedo!

Granda bruego.

Sinjinorino:—Kio la bruego?

Ogasauara:—Ĝin kaŭzis eksplodo de la pulvotenejo, ĉar ni antaŭe tion preparis.

Sur la scenejo pleniĝas nigra fumo kaj baldaŭ ruĝa flamo ekbruligas tie kaj ĉi tie.

Sinjinorino:—Nu, venis mia lasta momento.

Ogasauara sintiras en la apudan ĉambron.

Ogasauara:—Do permesu min.

Li pozas sin por tranĉi ŝian kapon.

Fajro plifurioziĝas. Malantaŭ la sceno aŭdiĝas bruo de interpuŝantaj armaĵoj. Plorkrioj.

—(KURTENO)—

NOTOJ

- 1) Samurajo (Buŝi):—Japana kavaliro, militisto en feŭdala tempo.
- 2) Samurajismo (Buŝidoo):—Speciala moralo de samurajo.
- 3) Ŝintoismo:—Japana religio plej malnova.
- 4) La lasta odo ĉe morto:—En Japnaujo instruituloj verkas poemojn, 17 silabajn aŭ ĥinlingvajjn ĉe sia mortolito. Tiu ĉi odo de la sinjinorino estas 31 silba poemeto.
- 5) Oracio (Oratio):—Preĝo: antikvaj kristanoj en Janpanujo nomis preĝon „Oracio“.
- 6) Asisto al sinmortigo:—La asistanto tranĉas la kapon de la sinmortiganto.
- 7) Halebardo:—Iom vasta glavo kun tenilo, ĉirkaŭ du metrojn longa.

JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Ŝin'Ogaŭamaĉi III-15, Uŝigome, TOKIO

昭和五年八月十二日印刷

昭昭五年八月十五日發行

[定價 20 錢 • 送料 2 錢]

譯 者 畑 村 上 正 知 世 行

不 許

福岡市大名町 3 の 105

發 行 者 九州エスペ란チスト聯盟

複 製

江 口 廉

東京市神田區三崎町 3 の 146

印 刷 者 高 見 澤 保 芳

東京市牛込區新小川町 3 の 15

發 賣 所

財團
法人 日本エスペラント學會

我國唯一のエス語普及・研究・實用の中心機関

財団法人 **日本エスペラント學會**

〔東京市牛込區新小川町3の15〕〔振替東京11325番〕

苟くもエスペラントの普及を庶幾せらるゝ方々は一日も速かに御入會下さい。會員へは毎月エス語研究雜誌 La Revuo Orienta を頒布す。會費は年2圓40錢(普通)、3圓(正)、5圓(贊助)、20圓(特別)。

— ★ 會 則 進 呈 ★ —

★★★ 學會出版の圖書其他 ★★★

	價 税		價 送料
エスペラント捷徑	1.00 6	對譯詳註叢書	
エスペラント講座	.50 4	マテオ・フアルコネ	.35 2
新撰エス和辭典	.60 2	ハイネ詩集	.40 2
エスペラント講習用書	.35 2	魔法使	.40 2
エスペラント		代理通譯	.40 2
短期講習書	.20 2	愛ある所神あり	1.50 8
エスペラント初等讀本	.30 2	エス語書き叢書	
エスペラント中等讀本	.30 2	骸骨の舞跳	.40 2
エスペラント發音研究	.30 4	倫敦塔	.15 2
エスペラント		惜しみなく愛は奪ふ	植字中
やさしい讀み物	.10 2		
愛の人ザメンホフ	.80 6		
日・エス・支・英		エスペラント	
會話と辭書	.65 4	單語カード	1.70 12
點字エス文法と		エス演說レコード	1.20 40
小辭典	1.00 6		

海外のエス書澤山取次いでゐます・目錄呈上